

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 4a — Aprilo 1955a

Fondita
en 1908a



Redaktejo-Administrejo :
de la Prezidanto de R.B.L.E. :

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Jubilea Festkunsido en Bruĝo

Dimanĉon, 20an de marto, la Bruĝa Grupo speciale festis siajn jubileantajn gemembrojn.

En festsalono de la hotelo „St-Hubert“, je la 3a posttagmeze, multaj gegrupanoj kunvenis en festkunsido ĉiujn kaj legante la senkulpigajn leterojn de diversaj pro malsano, ĉefe gripo, neĉeestantaj jubileantoj. Li faris enkondukan paroladon en kiu li speciale bonvenigis S-ron. M. Jaumotte, Prezidanto de RBLE. kaj S-inon Jaumotte, komparante ilin al geprincoj, kiuj faras sian ĝojan eniron en iu el siaj plej fidelaj urboj kaj prezentante la dezirospimojn de la Bruĝa Grupo por la progresigo de la tutlanda movado, substrekte la gravecon de la regula apero de „Belga Esperantisto“ kaj proponante agadon en pli malgrandaj centroj, kie nia

S-ro Ch. Poupeye, grupa prezidanto, malfermis la kunsidon bonvenigante ĉiujn kaj legante la senkulpigajn leterojn de diversaj pro malsano, ĉefe gripo, neĉeestantaj jubileantoj. Li faris enkondukan paroladon en kiu li speciale bonvenigis S-ron. M. Jaumotte, Prezidanto de RBLE. kaj S-inon Jaumotte, komparante ilin al geprincoj, kiuj faras sian ĝojan eniron en iu el siaj plej fidelaj urboj kaj prezentante la dezirospimojn de la Bruĝa Grupo por la progresigo de la tutlanda movado, substrekte la gravecon de la regula apero de „Belga Esperantisto“ kaj proponante agadon en pli malgrandaj centroj, kie nia

Tiu ĉi bildo montras la estraron kaj la jubileantojn dum la festkunsido. De maldekstre dekstren: sidantaj: S-ino Verbeke-Van den Berghe, S-ino Stroobandt-Victoor, S-ro Maur. Jaumotte, Liga Prezidanto; S-ro Ch. Poupeye, loka prezidanto; S-ino Poupeye kaj S-ro Et. De Craeke; kaj starantaj: F-ino Y. Van Parijs, S-ro Stroobandt, S-ro René Rosseel, S-ino M. Jaumotte, S-ro Karel de Coster, F-ino Is. Van Parijs, F-ino Yv. Poupeye kaj S-ro David De Meulenaere.

(Kliŝo „Brugsche Courant“)



La tria Beneluksa Kongreso

LA HONORA KOMITATO

La Urbestro de Utrecht, lia nobela moŝto, Jonkheer C. J. A. de Ranitz, afable akceptis la prezidantecon.

Multaj eminentuloj bonvolis akcepti la membrecon. Jen ili estas en alfabeto sinsekvo:

1. S-ro D-ro A. A. Bos, direktoro de la fabrikoj por la Nederlandaj Kooperativoj en Utrecht.
2. S-ino J. C. M. Boschloo-ten Bosch, prezidantino de la komitato „Utrecht akceptas.“
3. S-ro Inĝeniero C. Broekmeyer, direktoro de la telefondistr. Utrecht.
4. S-ro Inĝeniero J. B. Dumont, direktoro de la mezgrada Politekniko.
5. S-ro D-ro J. J. M. Feldbrugge, rektor

movado povas trovi novan kaj pli favoran grundon.

Tiam li transdonis la parolvicon al S-ro Jaumotte. Tiu ĉi en plej brila

(Sekvo sur paĝo 28)

toro de la Bonifacia Liceo.

6. S-ro Jhr. L. Huydecoper van Nigtevecht, prezidanto de la Cambro por Komerco kaj Fabrikoj.
7. S-ro F. Korteweg, prezidanto de la Nederlanda Vojaĝunuigo.
8. S-ro P. van Leeuwen, direktoro de la Ŝtata Seminario.
9. S-ro Jhr. F. H. M. Michiels van Kessenich, prezidanto de la Beneluksa Unuigo en Utrecht.
10. S-ro D-ro W. J. Thijsen, direktoro de la Ŝtata Mezgrada Lernejo en Utrecht.
11. S-ro D-ro B. G. L. M. Tosseram, rektor de la Komunuma Liceo.
12. S-ro H. van der Vlist, Skabeno pri Instruado k.t.p. de la komunumo.
13. S-ro J. C. Wilbrennink, direktoro de la Unuigo por Fremdultrafiko.

GRAVA SCIIGO

Lia ekscelenca moŝto, la Ĉef-Konsulo de Belgujo en Nederlando sciigis, ke li vizitos la kongreson.

LA PROGRAMO !

Sabaton posttagmeze estos la akcepto fare de la urbestro. Precizan tempon kaj lokon ni poste sciigos.

Je la 20-a komenciĝos la oficiala malfermo en la konstruaĵo „Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen“ (K en W). En Utrecht oni kutimas malfermi la pordojn duonan horon antaŭ la ĝusta tempo, por ke oni povu komenci je la fiksita horo. Kompreneble ne decas atendigi niajn invititojn aŭ veni en la salonon dum la parolado de iu, se oni povas eviti tion!

Post alparolo parto kantos sinjorino Koopmans-Schotanus. Ĉu estas necese laŭdi ŝin?

La grupo el Zeist ludos tute novan teatraĵeton: „Kion ni plej ŝatas?“

Kvankam ni scias iom pri la enhavo ni antaŭe ne parolos pri ĝi. Vi mem aŭdos la respondon.

Kaj denove sinjorino Koopmans-Schotanus kantas por ni.

La pluan parton antaŭ la balo pri zorgos la belgoj. Ankaŭ ili ne tro frue diros kion ni ĝuos. Espereble la L.K.K. scios tion antaŭ ol ni multobligos la kongreslibron.

Bona muzikistaro ludos dum la balo, kiu daŭros ĝis la dua nokte.

Dimanĉe: Diservoj. Pri ili aperos detaloj.

Matene je la deka la jarkunvenoj. Ili estos en la kongresejo (hotelo Smits, Vredenburg) kaj ne daŭros post la dektria.

Duonon post la dektria oficiala fotografado. Tre verŝajne ĝi okazos antaŭ la tria ĉef-administrejo de la fervojoj.

Je la dekkvara: mango ĉe Smits.

Vespere ni denove iros al „K. en W.". Komence horo kaj malfermo de la salono tiel kiel sabate. Sinjoro Mees van Huis, konata ĥorestro, aŭdigos la kantaton de „Frieso Moolenaar". La ĵunularĥoro sub gvidado de Sino Feith-Goetsch kunkantos.

„Stoffel van Viegen", la orgenisto de nia katedralo, ludos orgenon kaj iom malpli konataj, sed bonegaj pianisto kaj baritono kunlaboros.

Post la paŭzo ni prezentos filmojn. Ĉio kune do garantias bonan kongreson, post kiu vi lunde povos ĝui la naturon en unu el la plej belaj parkoj de nia lando.

Ni ne parolis pri la promenadoj tra la urbo. La L.K.K. petas tiurilate ĉies helpon. Bonvolu skribi al la sekretariino, F.ino A. J. M. Perk, Paulus Potterstraat 18, Utrecht, kiajn ekskursetojn vi ŝatas. Vi povas elekti inter: plantĝardeno, malnova nobela domo, muzeoj, la ekstero de malnovaj domoj, parkoj, k.t.p.

Beneluksaj Gejunuloj al nia Beneluksa Kongreso en Utreĥt

Laŭ informoj de S-ro K. Ruig, P. de Hoochstr. 50 I, Amsterdam Z. kiu interrilatis kun la estraro de la Nederlanda Junulargastej-Organizaĵo estos eble ke gejunuloj, kiuj volas viziti nian kongreson en Utreĥt povos je rabatitaj prezoj gastlogi en la junulargastejo „de Bunnik" en la tuja proksimo de Utreĥt. Oni anoncu sin ĉe S-ro Ruig, kiu donos ĉiujn necesajn informojn.

Kun granda bedaŭro ni komunikas ke mortis la 24-an de marto

S-ro Mag. A. J. Kalma

la fervora ĝen.sekretario de L.E.E.N. Nekrologo sekvos en venonta numero.

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO JUBILEA KONGRESO

31 jul.—6 aŭg. 1955

Adreso: ĉe C.I.T., Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo
Banko: Banka di Napoli, Bologna, konto 2824
Giro: Grupo „A. Tellini", Medaglie d'Oro 3, N. 8/20620, Bologna

Numero 5 OFICIALA KOMUNIKO Marto 1955

Kotizoj: Post 31 Marto la kotizoj plialtiĝis. Bonvolu konsulti la tarifon. Aligiloj haveblaj ĉe Landaj Asocioj de UEA kaj la Kongresa Oficejo (adreso ĉisupre). En la adreso nepre citu la nomon „40-a Universala Kongreso de Esperanto".

Limdato: Kiel kutime, la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio. Aliĝiloj devas esti ĉe la L.K.K. aŭ ĉe la Perantoj je tiu dato. En julio la administrantoj FERMAS LA KONTOJN por ordigi la kalkulojn necesajn je kontrolo kiam alvenas la kongresanoj. Pagojn kiuj venos post 30 junio, ni skribas en „ŝvebantajn" konton kaj redonas al la koncernaj personoj je alveno. Sendante monon zorgu do ke ĝi atingos la L.K.K. antaŭ la fino de junio. L.K.K. ne povas fari esceptojn de tiu praktiko.

Gazetara Servo: Oficialaj instancoj, kiuj deziros ricevi dum la kongreso la bultenojn de la Gazetara Servo, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al la L.K.K. por ke ĝi faru la necesajn antaŭzorgojn. Skribu adreson klare kaj indiku, ĉu oni deziras ilin a) ĉiutage, b) post la kongreso aŭ c) ĉu iu persono (nomu lin) mem prenos ilin en la Gazetara Servo.

Infana Programo: Al ĉiu kongresano ĝis la aĝo de 15 jaroj la L.K.K. sendis specialan cirkuleron koncerne apartan arangon. Laŭ la respondoj la L.K.K. agos.

Junulara Programo: La L.K.K. projektas specialajn programojn en la vesperoj de dimanĉo, merkredo kaj ĵaŭdo de la kongresa semajno speciale por la ĵunularo en la aggrupo 16-20 jaroj (aŭ iom pli). Dancado kaj distraĵoj. Skribu al L.K.K. ĉu vi havas intereson por tio.

Statistiko (ĝis 28 feb.): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 18, Belgujo 12, Brazilo 3, Britujo 75, Danujo 24, Finnuno 27, FRANCUJO 170, Germanujo 83, Hispanujo 5, ITALUJO 208, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 41, Kubo 1, Maroko 18, NEDERLANDO 113, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 73, Svislando 24, Usono 10. Sumo el 27 landoj: 937.

Interesaj ciferoj: Nemembroj de UEA 21.9 %; Instruistoj 18 %; personoj sub 21 jaroj 7 %.

Nome de la L.K.K.

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario.

40a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Arango F.I.L.E.-R.B.L.E.

Pro la nesufiĉa intereso ni kun bedaŭro konigas ke ni devas rezigni al la organizo de karavano. Ĉiu partoprenonto devos do mem prizorgi sian vojaĝon kaj loĝadon.

EN LA KAZO KE

vi estos malhelpata partopreni en Bologna, tuj pripensu ĉeeston al la plej granda faka kongreso esperantista. De la 8-a ĝis 13-a de Majo 1955 kongresos en Zürich la Internacia Fervojista Federacio kaj atendas 400-500 partoprenontojn. Rajtas aliĝi ĉiu esperantisto. La programo estas ankaŭ por nefervojistoj tre alloga kaj prezentos ia.: Interkonatiga vespero, Solena Malfermo, fakaj prelegoj, faka,

ekskursoj, ŝipekskurso, urbrondveturado, filmvespero, FOLKLORA VESPERO kaj postkongresa vojaĝo al Les Pleiades, al la narcisaj kampoj. Kongreskotizo sv. fr. 18.—, limdato por aliĝo 15a de Aprilo. Perantoj estas la landaj fervojistaj societoj, laŭ adresoj pago 65 de la UEA-jarlibro 1954. Venigu tuj la aliĝilon kun ĉiuj necesaj informoj de O. Walder, ĉefdelegito de UEA, Eigenheim Romanshorn, Svislando.

Samideanoj favorantaj la plej viglan kaj fortan fakan movadon, sed malhelpataj ĉeesti en Zürich anigas kiel „Simpatiantoj", pagante fr. 5.— (14 rkp). Interŝanĝe vi ricevos la kongreslibron kaj insignon.

(vidu p. 3).

KARUSEL-VOJAĜO

Aldone al la unua komuniko mi prezentas al vi pli detalan programon. TAGO.

1. Amsterdam Forveturo je la 8a
Köln Alveno „ „ 15.55a
Rezervita sidloko en la „Europabus" preter Utrecht - Arnhem - Emmerich - Dinslaken - Duisburg (lunĉo) kaj Dusseldorf. Tranokto en Köln.
2. Restado en Köln. En la mateno autobus-ekskurso en Köln. Tranokto.
3. Köln Forveturo je la 8a „ „ per ŝipo sur la Rhein.
Wiesbaden Alveno „ „ 20.40a „
Tranokto en Wiesbaden.
4. Restado en Wiesbaden. Posttagmeze per aŭtobuso vizito al la kasteloj de la Rhein kaj Lorely. Tranokto.
5. Wiesbaden Forveturo je la 8.25a
Luxemburg Alveno „ „ 15.—a
Rezervita sidloko en la „Europabus" preter Mainz - Bingen - Trier (lunĉo). Tranokto en Luxemburg.
6. Restado en Luxemburg. Posttagmeze autobus-ekskurso al Echternach, la eta Luksemburga Svislando. Tranokto.
7. Luxemburg Forveturo matene „ „ la somera hortabelo ankoraŭ
Bruxelles Alveno tagmeze „ „ ne aperis.
Ĉi tiu trajekto okazos vagonare. Tranokto en Bruxelles.
8. Restado en Brussel. Matene autobus-ekskurso tra la urbo. Tranokto.
9. Brussel Forveturo matene „ „ la somera hortabelo ankoraŭ
Amsterdam Alveno tagmeze „ „ ne aperis.
Ĉi tiu veturo okazos vagonare. Tranokto en Amsterdam.
10. Restado en Amsterdam. Duontaga ekskurso tra la urbo. Tranokto.
11. Restado en Amsterdam. Duontaga ekskurso al Volendam kaj la insulo Marken. Tranokto en Amsterdam.
12. La dua rondo komenciĝas. Tiuj, kiuj aliĝis dumvoje, restas en la grupo ĝis la loko de foriro. Entute okazos 8 rondoj.

La unua rondo de Amsterdam komenciĝas la 20an de Junio.

„ „ „ „ Luxemburg „ „ 26an „ „

„ „ „ „ Bruxelles „ „ 28an „ „

La dua rondo komenciĝas respektive la 1an-7an kaj 9an de Julio k.t.p.

La vojaĝo por la Belgioj estas de Brussel ĝis Brussel. La restado en Brussel ne estas enkalkulita. La prezo en frankoj estas la kontraŭvaloro de Hfl. 263.—, kiu validas por, la Europabus-ŝipo sur la Rhein-vagonara veturo-dua klasa hotelo-mateno-mango-vespermango-lokaj ekskursoj (Amsterdam-Köln-Wiesbaden-Luxemburg) enirprezoj por la vidindaĵoj kaj trinkmono. La lunĉoj ne estas enkalkulitaj.

Detala prospekto estas en preparo. Petu ĝin ĉe la aranganto de la karusel-vojaĝoj

Hans Bakker

v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33
Amsterdam-Z. tel. 95320

NOVA N.R.V.-VOJAĜO POR ESPERANTISTOJ

Post la sukcesa pasintjara vojaĝo tra Danujo, la grava Nederlanda vojaĝunuigo decidis ĉi-jare okazigi similan vojaĝon tra Belgujo kaj Francujo. Ĝi okazos denove per turisma aŭtobuso kaj daŭros 11 tagojn, de la 30-a de Julio ĝis a 9-a de Aŭgusto inkluzive.

Oni vizitos Gent, Brugge, Parizon, Kastelon Grésillon en plena funkcia, la provincon Anjou kaj faros unikan rondiron preter la kasteloj de la rivero Loire. Plue vizito al Orléans, Fontainebleau, Reims kun ĝia fama katedralo kaj revenos laŭ la pentrinda valo de la Maas post pasigo de unu tago kaj du noktoj en la Belgaj Ardenoj, en Dinant.

Dank' al la kunlaboro de la Ĉefdelegito de U.E.A. por Francujo, s-ro Jean Guillaume ni havos ĉie kontakton kaj helpon de la lokaj samideanoj,

por ke la vizito al la diversaj regionoj estu laŭeble agrabia kaj instrua. Partoprenos ankaŭ alilandaj samideanoj, kio faros el ĉi tiu vojaĝo neforgeseblan travivaĵon por la partoprenantoj.

Por la unua fojo la N.R.V. presigos Esperantlingvan tekston pri ĉi tiu vojaĝo en sia ĉiujara gvidlibro pri la organizataj someraj vojaĝoj. Se vi konsideras, ke ĉi tiu diketa volumo estas dissendata en 200.000 ekzempleroj, vi facile komprenos, kiom granda estas la propaganda valoro de ĉi tiu anonco. Tial estas tre dezirinde, ke ankaŭ ĉi tiu vojaĝo fariĝu sukceso, por enpenetrigi nian lingvon en la rutinan agadon de ĉi tiu potenca unuigo.

Mi kore instigas vin, skribi al la Centra Oficejo de la N.R.V., Zeestraat 100, Hago, komunikante, ke vi interesiĝas pri la Esperanta Vojaĝo kaj

7-a Internacia Kongreso de Fervojistaj Esperantistoj

Adreso: Zürich 23, poŝtfako 2311.
Dato: 8-a ĝis 13-a de Majo 1955.

Programo: Interkonatiga Vespere, Solena Malfermo, fakaj prelegoj, fakaj ekskursoj, ŝipekskurso sur Lago de Zürich, urbrondveturado, filmvespero, FOLKLORA Vespere, postkongresa vojaĝo al narcisaj kampoj de Les Pleiades.

Kondiĉoj por partopreni: rajtas aliĝi ĉiu esperantisto. La programo ankaŭ por nefervojistoj estas alloga. Kotizo: sv. fr. 18.—.

Limdato por aliĝo: 15-a de Aprilo 1955.

Partoprenantoj: antaŭvideble 400-500 el 12-15 landoj.

Perantoj: La fervojistaj landaj societoj, laŭ listo en UEA-jarlibro 1954 pago 65. Simpatiantoj subtenas la celojn de la kongreso per fr. 5.— (14 rkp) kaj ricevos kongreslibron kaj insignon.

Aliĝilon kun ĉiuj necesaj informoj havebla de O. Walder, ĉefdelegito de UEA, Eigenheim, Romanshorn, Svislando.

LKK Zürich sukcesis en jenaj klopodoj:

La zürĥa PTT-direkcio decidis starigi automobila poŝtoŝtation antaŭ la kongresejo. Deĵoros sperta esperantista oficisto ĉe la ĝiĉeto.

Speciala kongresstampilo estos uzata.

S-ro d-ro Lepori, federacia konsilisto, ĉefo de la svisa fervoj-kaj poŝtdepartemento akceptis esti prezidanto de la honora komitato.

La kongresparoladon faros nia eminenta samlandano, s-ro d-ro Edm. Privat, profesoro Neuchatel.

petante la (senpagan) alsendon de la somera gvidlibro, ĵus aperinta. Kiel gvidonto de la vojaĝo, mi faros mian planan eblon por ekspluati dum la vojaĝo kaj poste ĉiujn prezentigotajn okazojn favore al la ĝenerala propagando por Esperanto.

S. PRAGANO.

Anoncetoj

Deziras korespondi:

Georges Gourdain, 28jara, Rue du Collège, Baugé, Maine N. Loire.

Fino Fanti Felice, Via Bartoloni N. 5 Bologna, Italujo.

Robert Hourcade, Rue du Nord 16 Parizo XVII, Francujo. (16jara).

Feher Zoltan, Satonaljanjhelg, Dor-sa 94 u.M. (14jara) Hungarujo.

Jean Kohen, Rue Jules Valles 3, Parizo XI (15jara).

(Ĉiuj estas komencantoj).

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Generala Sekretario: S-ro H. Stelens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-
 rui, 21, Antverpeno.
 (Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Al la Grupoj

Jam la numero de marto ne plu estis sendata al la nerepagintoj.

Do ankaŭ ne tiu ĉi numero de aprilo. Ĉu vi jam faris la neceson por memorigi al la prokrastintoj sian devon?

Se jes, dankon. Se ne, faru tuj!

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“
 (Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 11an de marto radiofona teatraĵo estis aŭdigata per la magnetofono: „La Fino estas la plej valora“, verkita de la tre fidela membro S-ro P. Van der Hooydonck. La teatra sekcio de la grupo sub la reĝisoreco de S-ro R. Jaumotte plenumis la diversajn rolojn. La nova elemento. S-ro Carlos Tytgat, pruvis ke li havas artistemon en la sango ĉar li majstris sian rolon kiel vera artisto. S-ro J. Montmirail, laŭ kutimo, bone flegis la aparatojn kaj samtempe la sonfektejojn. F-ino C. Peeters, S-inoj F. Jaumotte kaj P. Tytgat, S-roj R. Jaumotte kaj J. Verstraeten vigle prizorgis la aliajn rolojn je la kontenteco de la publiko, kiu atente aŭskultis kaj je la fino ne ŝparis sian aplaŭdon.

La 18an, S-ro J. Verstraeten paroladis pri „Vetrofabrikado“. Dum pli ol unu horo la paroladisto, helpe de lumbildoj, klarigis al la ĉeestantoj la diversajn metodojn kiujn oni uzis por krei vitrofolion. Li skizis la historion de la vitro tra la jarcentoj kaj longe haltis ĉe la modernaj nunaj metodoj, kiuj permesas produkti la nunajn grandajn, belajn vitrojn. Fine li montris kelkajn aplikojn sur la vitra kampo kaj eksperimente montris la manieron por argenti la vitron, kiu iĝas do spegulo. Varma aplaŭdo kaj dankvortoj de la Prezidanto konkludis tiun kunvenon.

La 25an, la kabaretistoj plenigis la pro-

gramon. Tiun ĉi fojon la artistoj ankaŭ sukcesis distri la publikon dum kelkaj ho-

(Sekvo de la unua paĝo)
 improvizado, unue honorigis la estintajn prezidantojn de RBLE kaj speciale inter ili S-ron A. J. Witteryck, prezidanton-fondinton de la Bruĝa Grupo. Li ankaŭ emociis parolis pri F-ino Yvonne Thooris, kiu dum longaj jaroj estis la agema vicprezidantino de RBLE kaj samtempe la vigla kaj aminda prezidantino de la Bruĝa Grupo. Tie, li menciis S-ron Ch. Poupeye, kiu dum proksimume dek jaroj estis sekretario de RBLE, kiun funkcion li rezignis en 1946 por dediĉi siajn tutajn fortojn al la restarigo de la Bruĝa Grupo.

Tiam li laŭdis la 16 jubileantajn gemitrojn, kiuj pruvis per sia longjara fideleco, ke ili vere amas la grupon kaj la ligon, kaj, en plej elokventa parolado, li proklamis ke se tia amo sin aldonas al la espero, kiu vivas en la koro de ĉiu esperantisto, tiu unuiĝo neeviteble devas konduki al la venko de nia movado.

Entuziasmaj aplaŭdoj substrekiis la finon de tiu majstra parolado. Tiam, S-ro Jaumotte, rimarkiginte ke Ges-roj Poupeye jam ricevis sian jubilean medalon dum la Jubileaj Festoj, la 13-an de februaro en Antverpeno, kaj S-ro Ch. Poupeye ankoraŭ plie la arĝentan medalon „Pro Merito“, fiksis la honormedalon destinitan al F-ino Yvonne Thooris, sur la brusto de ŝia baptofilino F-ino Yvonne Poupeye, kaj poste same honorigis la ĉeestantajn jubileantojn: S-inon Alice Stroobandt-Victoor, (1925); S-ron Auguste Stroobandt (1926); S-ron René Rosseel (1926); S-ron Etienne De Craeke, Hon. Prez. de la Bruĝa EKI,

roj: F-inoj J. kaj M. Amerijckx kaj L. Vinck vigle prezentis skeĉojn verkitajn de S-ro J. Vinck (nunmomente plenumante sian armean servon). La fraŭlinoj estis bone helpataj de S-roj W. Deroisy, P. Peelman kaj F. Schellekens (ludanta same lerte kiel dum la jubileaj festoj). Por la muzika parto S-roj K. Amerijckx kaj J. Peelman elektis kaj aŭdis amuzajn kaj belajn kantojn kaj S-ro A. Verhoeven sin

(1926) kaj S-ron Karel De Coster (1928).

Nome de tiuj, S-ro Etienne De Craeke, esprimis dankojn al S-ro Jaumotte, al Belga Ligo kaj al S-ino Jaumotte, kiun li petis akcepti kelkajn florojn el la manoj de unu el la plej junaj membroj de la grupo, S-ro Marcel Poupeye. S-ino Stroobandt ankaŭ dankis nome de ŝia edzo kaj de ŝi mem kaj petis senkulpigon, ĉar ili ambaŭ devas forlasi la feston pro la funebro kiu ĵus trafis ilin.

Por fini tiun oficialan parton „La Espero“ estis kune kantata. Sekvis posttagmeza manĝeto proponata al la jubileantoj. F-ino Albertine Ballegeer, nova lernantino de Septembro 1954, deklamis belakcente kaj sentoplene „La Skribisteto“, de Guido Gezelle en la versa traduko de Maur. Seynaeve kaj „Mia patro kaj mi“ de Julio Baghy. Sekvis ŝin F-ino Paulette De Staercke, kiu belvoĉe kantis du nuntempajn sukcesojn. Ambaŭ membrinoj estis varme aplaŭdataj.

Jam estis tempo por Ges-roj Jaumotte forlasi la festkunsidon. Post amika manpremo al ĉiuj, ili eliris la festsalonon dum adiaŭaj aplaŭdoj ilin salutis.

Baldaŭ la tabloj kaj seĝoj estis flankenŝovataj kaj la disaŭdigilo plenigis la salonon per danmuziko kaj junaj kaj maljunaj malrigidigis siajn kruvojn ĝis preskaŭ du horoj post la antaŭvidita finhor.

Ni aldonu ke la loka gazetaro promove sendis raportiston kaj fotografistojn kaj ke favoraj artikoloj kun kliŝoj aperis en la lokaj kaj eĉ en kelkaj tutlandaj gazetoj.

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
 ANTVERPENO

Por via MUZIKO,
 RADIO kaj GRAMOFONO

rimarkigis per siaj deklamaĵoj.

F-ino C. Peeters, kiel kutime, vigle kaj lerte akompanis ĉe la piano. Speciale citinda estis nova lernantino el la nuna kurso, F-ino A. Smet, kiu violone prezentis kun granda arto kelkajn klasikajn muzikaĵojn, kiuj vekis ĉe la publiko merititan aplaŭdon. Oni konkludis la vesperon per kunkantado de speciale por tiu okazo verkita kanto de S-ro P. Peelman.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“ Frankrijklei 4, je la 20.30a h. (I-a Etaĝo)

APRIL: (memorige): la 1an: Parolata ĵurnalo; la 8an: La Pasio en la Artoj; la 15an: Niaj Jubileaj Festoj (Filmo prezentata de S-ro Montmirail) Lotumado de memfaritaj premioj; la 22an: Preparolo de eventualaj kontraŭdiraĵoj al Esperanto; la 29an: Debato: „Modernismo en la artoj“ (Enkonduko de F-ino B. Geers).

MAJO: La 6an: Parolata ĵurnalo: Dimanĉon, la 8an: Aŭtoĉarekursuro al Walcheren. Fr. 110.; la 13an: Elsendaĵo de du teatraĵetoj de S-ino Luc. Faes; la 20an: Parolado de F-ino Math. Hofkens; la 27an: Amuza vespero; la 28an, 29an, 29an kaj 30an: Partopreno al la Kongreso en Utrecht.

BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 8an de marto post 5a leciono de la kurso, estis disaŭdigata parolata gazeto kun artikoloj de F-ino Is. Van Parys, pri „Ben-

Reĝa Belga Ligo Esperantista

La anoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista estas petataj ĉeesti la jaran kunvenon, kiu okazos sabaton, la 30an de aprilo 1954a, je la 16a horo, en la „Brasserie de la Justice“, Justeca Placo, Bruselo (tutapude de la Centra Stacidomo).

Tagordo:

1. Raporto de la administrantaro
2. Aprobo de la bilanco de la jaro 1954a
3. Fiksado de la kotizo
4. Budĝeto 1955a
5. Laŭstatutaj elektoj
6. Diversaĵoj.

Rimarko. La Grupoj estas petataj proponi kandidatojn por la administrantaro. Grupanoj, kiuj ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunsidon, povas anstataŭigi sin de alia membro, do-nante al li skriban ateston.

La Prezidanto.

La administrantaro de la Ligo kunvenos en la sama salono, jam je la 14.30a horo kaj, — tuj post la ĝenerala kunsido, — eventuale daŭrigos la priparoladon de la tagordo.

jamin Franklin“; F-ino P. De Staercke, pri „Irving Berlin, la homo je la 800 melodioj“, kaj S-ro Marcel Poupeye pri „Humorajoj“.

La kunveno de la 15-a de marto estis ĉefe dediĉata al preparo de la Festkunsido de la 20a de marto, pri kiu estas raportata aliloke en tiu ĉi revuo, kiel estis buŝe en la grupa kunveno de la 22a de marto. En tiu kunveno ni revidis kun ĝojo, post iom longa foresto: S-ron E. Herreweghe, ĵus reveninte post dumonata marvojaĝo ĝis Mekziko kaj S-ron F. Clauwaert, kiu faras nuntempe sian soldatan servon.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno: ĉiutage je la 20-a, en la sidejo: „Gouden Hoorn - Cornet d'Or“, Simon Stevinplaats 2.

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: Elementa kaj perfektiga kurso. Ankaŭ la malnovaj membroj ĉeestu tiun unuan horon. Dum la dua horo:

MAJO: 3-an: Parolata gazeto; 10-an: Raportado pri la kermesa foiro; 17-an: Parolado de F-ino M. Willems: Subjekto

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
 KONSTRUAĴOJ

elektota; 24-an: Lastaj aranĝoj por la Beneluksa Kongreso; 31-an: Raportado pri la Beneluksa Kongreso en Utrecht.

Kondolencoj

Al S-ro Jozef TANGHE, de longaj jaroj membro de la Bruĝa Grupo, pro la morto de lia bopatrino: S-ino DE SUTTER-SANDERS (13/3/55).

Al Ges-roj Aug. STROOBANDT-VICTOOR, gemitrojn jubileantoj de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia bopatrino kaj patrino: S-ino VICTOOR-MAENE (14/3/55).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉekkonto 12.30.48)

London, la 14an de marto S-ro Cl. Piron ĉiujn interesigis per tre bela parolado, en kiu li pritraktis la ĉinan lingvon kaj la ĉinan skribon kaj per kiu li akiris veran sukceson.

La 21an sekvis la ĉiam instrua perfektiga kurso de S-ro Van der Stempel, kiu komencis per la reflektivaj adjektivoj kaj finis per multaj bone elĉerpitaj ekzemploj.

La 28an, S-ino Lucy Castel prizorgis la karnalvesperon kun siaj ĉiam bongustaj lorenaj kukoj. S-ino Marg. Weyn organizis tre belan tombolon kaj S-ro Jacobs, per gramafonmuziko, kreis tre gajan danatmosferon.

Programo de la venontaj kunsidoj:

MAJO: London, la 2an: Parolata ĵurnalo; la 9an: Parolado de S-ino Stern pri „Proceso“; la 16an: Perfektiga leciono de S-ro Vander Stempel; la 23an: Parolado de S-ro Swinne pri „Perspektivoj“; la 28an, 29an kaj 30an: Partopreno al la Beneluksa Kongreso en Utrecht.

Por sia vintra provizo
 Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe **BELGOMINE**

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

Sur tiu ĉi bilbo oni vidas la grupon de la bruĝaj partoprenintoj al la honorigo de la jubileantoj, al kiuj S-ro Jaumotte transdonis la medalon.

(Kliŝo „Brugsch Handelsblad“)



BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de Bruĝa Grupo Esperantista.
 Tel. 314.59

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

Bibliografio

Rimarkinda politika libro

Vladimir Dedijer: „TITO“, eldonis Slovena Esperanto-Ligo, Ljubljana, 518 paĝoj, bindita.

El la tempo de la milito, kiam jugoslavaj partizanoj sub Nosip Broz Tito batalis solaj kaj sen rekono de eksterlando kontraŭ la atakantoj restis ankoraŭ multaj legendoj pri ilia gvidanto Tito. Hodiaŭ li jam ne estas mistera persono, oni konatigis kun li bone en eksterlando, kiam li vizitis Turkujon, Grekujon, Britujon kaj Hindujon. Tamen la kono pri lia historio kaj personeco estas ankoraŭ malmulte disvastigita kaj pro tio ni tre aklamas la publikigon de lia oficiala biografio, en Esperanto verkita de Vladimir Dedijer, partizano, gazetestro, parlamentano kaj profesoro pri historio.

La libro estas ankoraŭ pli valora pro tio, ke ĝia heroo, Tito, hodiaŭ okupas tre gravan lokon inter la du grandaj politikaj blokoj kaj trovas plenan rekonon kaj en Vaŝingtono kaj en Moskvo. Li sukcesis krei al sia lando pozicion, kian ne havas multaj aliaj, ĉar ĝi estas ĝenerale respektata, kvankam ne ekskluzive amata. En la okcidento oni riproĉas al ĝi ĝian komunistan karakteron kaj la manko de vera parlamenta demokratio, en la oriento oni riproĉas ĝin, ke ĝi malobeis Stalinon kaj iris sian propran vojon. Due la libro estas interesa, ĉar ĝia aŭtoro, Vladimir Dedijer hodiaŭ ne plu estas favorata persono en la regantaj cirkoloj de Belgrado. Pro tio ke li donis sian subtenon al sia amiko, Milovan Djilas, kiu postulis plian grandan liberecon en Jugoslavio, li perdis ĉiujn siajn oficojn kaj fine eĉ estis kondamnata al provizora mallibereco. Legante la libron oni ofte demandas sin, ĉu Dedijer skribus hodiaŭ denove la samon.

La Tito-biografio estas tre interesa legaĵo por homoj, kiu ŝatas aktualan historion. Ĝi konsistas el du ĉefaj elementoj, la vivo de Tito kaj la evoluigo de hodiaŭa Jugoslavio. Ni konatigas kun la biografio de malriĉa junulo, kiu estas plena de idealismo kaj de la kredo, ke li plej bone helpas al sia popolo per la vojo skizita de la komunistaj partioj. Li partoprenas la unuan mondmiliton estas grave vundita kaj kaptita en Rusujo, kaj post la milito li baldaŭ fariĝas gvidanta politika agento en sia hejmlando. Li suferas punon en malliberejo de pli ol kvin jaroj. En 1938 la Kominternio faras lin gvidanto de la jugoslava komunistaj partio, kies ĉefo Grokić fariĝis viktimo de la grandaj purigoj, kiuj tiutempe furiozis en Rusujo. Post la malvenko de Jugoslavio en 1941 Tito kiel unua ekprenas la standardon de la ribelo, kaj liaj par-

tizanoj, kiujn li organizas en la popolliberiga armeo dum la tuta milito frontas la germanojn, la italojn kaj la rivalantajn partizanojn de Mihailović. Ili konstruas kernon de libera teritorio meze de la fortikaĵo Eŭropo. Ekde la komenco de la milito Dedijer jam ne plu rakontas la personan sorton de Tito, sed tiun de Jugoslavio, kaj pli kaj pli la ĉefa pezo de lia raporto centras pri la rilatoj inter Sovjetio kaj Jugoslavio. Ili jam dum la milito ne estis tiel bonaj, kiel oni imagus ekster la komunista mondo, ĉar la rusoj ne favoris la memstaran ribeladon de la jugoslavoj. Ili eĉ pli longe ne helpis ilin ol la usonanoj kaj angloj. Nur fine ili kunlaboris sed klam ek estis novaj disputoj pro la malbona konduto de la ruĝa armeo sur jugoslava teritorio kaj poste pri la deziroj de la rusoj ekspluati Jugoslavion, igi ĝin satelito servanta la mastron en Moskvo. La drama rakonto pri la rompa inter Tito kaj Stalin estas unu el la plej interesaj dokumentoj de la moderna historio. Nur en la fino de la libro la aŭtoro ankoraŭ foje okupiĝas pri la persono de Tito mem, kiu li priskribas kun simpatio, kompreneble, sed tute ne en la stilo de heroo, tio impresas la eksterlandan leganton tre agrable.

La libro estas verkita en simpla, senpretenda stilo, kaj tia estas ankaŭ la Esperanta traduko. Ĝi estas tre flue legebla kaj despli rimarkinda, ĉar la tradukanto, nia estimata KKS, Mason Stuttard faris tiun tradukon laŭ la angla eldono de la libro en rekorda tempo. Oni jam riproĉis al li, ke li tro ofte uzas la eblecon de la rekta verbigo de ne-verbaj radikoj, sed oni kutimiĝas al tio legante kaj ne malŝatas tiun eblecon krei pli fluan rakontmanieron. Vere ŝokita la recenzanto estis nur en unu loko, nome en jenaj linioj: „Tito feris... la insulo longas kaj larĝas... la suda bordo eĉ ne kaj sable strandas kaj la safira maro klaras... Sunoplenis... Meze de la insulo vertikalis ŝtona muro. „Tiu ekzemploj iomete „troas“ sur nur dek linioj! Alia afero, kiu la recenzanton multe pli agacas en ĉi tiu kaj en aliaj jugoslavaj libroj estas la vorto „jugoslava“ mem, kiu ŝajne ne havas ekzistojn en ili. La jugoslavoj pretendas ke ne ekzistas jugoslava popolo, sed nur kroatoj, serboj, slovenoj ktp, oni tial devas diri Jugoslavio (je puno de morto ne „Jugoslaviujo“) kaj tie vivas „jugoslavianoj“ kiuj okupiĝas nur pri „jugoslaviaj“ aferoj. Nun, ni ne povas preskribi al la slovenoj ktp kiun senton ili havu al la

Grava Dokumento

estas la februara numero de „Esperanto - Revuo Internacia“. Ĝi entenas ampleksan raporton pri ĉiuj okazintaĵoj en Montevideo, pri la efikoj de la UNESKO-decido, pri la Universala Ekspozicio de Esperanto; ankaŭ represon de la ĉefaj leteroj kaj dokumentoj rilate la aferon ĉe UNESKO.

Ĝin certe dezirus aĉeti kaj konservi kiel gravan historian dokumenton ĉiu Esperantisto. Tial ĝi estas vendota kiel libro 40 paĝoj. Prezo 1 ŝ. 6 p. (ĉe UEA).

jugoslava federacia ŝtato, sed kial ili portas tiajn naciajn strangajojn en la internacian lingvon? Ekzistas aliaj federaciaj aŭ multpopolaj landoj, kie oni tamen rezignis pro naciaj kaŭzoj komplikigi la internacian gramatikon, aŭ ĉu ni komencu skribi anstataŭ svisa kaj belga, „svisia“ kaj „belgia“, kaj la tieaj enloĝantoj estu „svisianoj“ kaj „belgianoj“ kaj fine ni eble nomu la landojn „Svisianujo“ kaj „Belgianujo“ por restarigi nin en la kadron de la esperantaj landnomoj? Stranga afero, ĉu ne? Eble la jugoslavianoj, kiuj ne volas esti jugoslavoj, iam pripensos tion. Mi tamen ne volas fini per tiu kritiketo sen gratuli al la Slovena Esperanto Ligo pro la aperigo de ĉi tiu tre valora libro. A.B.

AKUTAGAWA: LA KAPAO KAJ ALIAJ RAKONTOJ

Tradukis el la japana Nozima-Yasutaro Tokio Japano Esperanto-Instituto 1954. 94 p.

La belete prezentita libro enhavas 4 rakontojn de la moderna japana verkisto Akutagawa-Ryunosuke (1892-1927). Ili estas variaj laŭ la temo, sed ne faras grandan impreson. La ĉefa rakonto estas metita en la buŝon de paciento en psikiatria hospitalo kaj havas satiran tonon, ĉar la strangaj kapaoj (fantaziaj bestoj) kondukas ekzakte kiel certaj homoj.

La stilo de la traduko ne estas ĉiam glata, precipe ŝoka estas la uzo de „ol“ en la senco de „anstataŭ“: Ol malami lin mem, mi sentis simpatian naskiĝi en mi. (p. 23). Kiu komprenas la ĵenon?

„Du kelkaj momentoj ni lasis nun suprenrigardi ĉi tiun eksterordinare grandegan katedralon, kiu similis, ol konstruon, sed pli ĝuste ekstravagancon monstrojn.“ p. 41. J.H.

LA FIANĈINO DE OLIVETAN estas unuakta teatraĵo, verkita de Denise Hourtisque kaj reviziita de M. Arger kaj

Esperanto „magnifike“ utiligebla, diras konata nederlanda verkisto

Maurits Dekker skribis en 1949 teatraĵon, sub la titolo: „De wereld heeft geen wachtkamer“ (La mondo ne havas atendejon). En 1951 ĝin tradukis F. Faulhaber en Esperanton. Multaj samideanoj ĝin legis, multaj ĝin jam vidis sur la scenejo, ĉar ĝi atingis ĝis preskaŭ 1500 prezentadojn en Nederlando, Belgujo, Germanujo, Izraelo, Danlando ktp., en diversaj naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Antaŭ kelkaj monatoj (precize la 19-an de oktobro 1954) la dramo de Maurits Dekker trovis sian unuan prezentadon en la franca lingvo, en kiun ĝin tradukis s-ro R. Olivaux el la Esperanto-traduko. La prezentado, kiu okazis en teatrosalono „Bretagne“ en Nantes, fariĝis granda sukceso.

La urba gazetaro akcentis speciale la fakton, ke la dramo estis tradukita en la francan lingvon el Esperanto. Jen kion publikigis *Le Populaire de l'Ouest* de 21.10.54: „Traduki el Esperanto teatraĵon verkitan en la nederlanda lingvo, — tio povus esti vetkonkurso. Pere de Esperanto estis necese esplori la psikologion de ĉiu el ĝiaj personoj, precize koncepti iliajn karakterojn, malkaŝi iliajn plej sekretajn subtilaĵojn. Unuvorte, ne sufiĉis redoni al la frazoj pure laŭvortan signifon sed, multe pli, estis necese rekrei

ĉiun protagoniston, ne modifante iom de lia profunda naturo. Jen, sen rezervo, oni povas nur admiri la kompletan sukceson de s-ro Robert Olivaux.“

La Résistance de l'Ouest de 21.10.54 nomas la tradukon de s-ro Olivaux „ekscelenta“.

S-ro Loomans, nederlanda lingvo-instruisto, loĝanta jam ok jarojn en Francujo, konfesis ke „... leginte kaj komparinte la nederlandan tekston frazon post frazo kun la franca traduko elesperanta, mi estas mirigita konstatante la fidelecon, je kiu la vera senco de la nederlanda teksto estas observita ... Esperanto neniel deformis la tekston nek la sencon de la tradukita lingvo ...“

Kaj, fine, kion diris la nederlanda aŭtoro mem pri la franca traduko elesperanta de sia verko: „... En via traduko vi konservis la ekzaktan enhavon de mia dramo ... Tio frapas min des pli, ĉar vi uzis Esperantan tekston. Tiel vi konfirmis al mi, ke la internacia lingvo estas magnifike (t.e. grandioze) utiligebla.“

Ni aldonu, por niaj legantoj kiuj ĝin ankoraŭ ne scias, ke Maurits Dekker ne estas esperantisto, sed li fariĝis granda amiko de nia afero kaj ne hezitas, konfesi tion publike.

(El: Heroldo).

H. A. de Hoog. La tradukanto estas André Bachelier. Eldonis ĝin la franca sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia, 2 Avenue Debidour - Parizo (19e) Francujo. Prezo ne indikita. La enhavo rekondukas nin al la unua periodo de la reformaco, kiam la protestantoj suferis pro gravaj kaj teruraj persekutoj ofte finiĝantaj sur la brulŝtupo. Ĝenerale la lingvo estas bona, kvankam kelkaj gramatikaj eraroj ne mankas. Ekz. paĝo 2: li edzigis sencerbulinon tian, KIA vi. (kiel), paĝo 3: Neniam mi vidis lin kolerantan (koleranta) konduki ĝis bona fino (al); paĝo 6: ĝis ĵeti nin (prepozicio antaŭ infinitivo).

Ĝi estas havebla kontraŭ 1 respondokuponon ĉe la suprenomita adreso.

JARLIBRO de U.E.A. unua parto aperis por la jaro 1955 en sia kutima formo. Kiel ĉiam ĝi enhavas multajn sciindajn rilate nian movadon kaj pri U.E.A. mem. Ankaŭ la rezolucio akceptita en Montevideo troviĝas en ĝi.

MATEMATIKO TERMINARO verkita de S-ro C. M. Bean, B.Sc., Ph., D., F.R.I.C. eldonita de U.E.A.; prezo ŝ 1.6 p. Kompreneble la enhavo de ĉi tiu libreto havas ĉefe valoron por la kompetentuloj en la koncerna fako, tamen ni povas ĝoji, ke de tempo al tempo aperas pli da tiaj terminaroj pri di-

versaj fakoj kaj sciencoj ĉar tio ja montras ke nia lingvo ĉiurilate taŭgas por esprimi ĉiujn konceptojn sur kiu ajn tereno.

La verketo estas dividita en du partojn. La unua enhavas alfabetan liston de diversaj nocioj kaj la dua la klarigon de tiuj nocioj, dividitan en 5 sekcioj laŭ la temoj: a. Algebro, Infinitesima Kalkulo, Trigonometrio; b. Geometrio, Analitiko; m. Aplikata Matematiko; n. Aritmetiko, Nombroteorio kaj s. Statistiko.

FUNDAMENTA KRESTOMATIO de la lingvo Esperanto, de L. L. Zamenhof, 17-a eldono, bindita, 1954, p. 446; eld. The Esperanto Publishing Company Limited, Rickmansworth (Angl.). Mendebla ĉe via Libro-Servo. *Recenzota.*

ITALA TURISMA KLUBO en Milano eldonis ampleksan esperant-lingvan flugfolion pri multaj turismaj scindadoj en Italujo. Se vi volas viziti ĝin ne forgesu mendi ĉi tiun informilon, kiu estas senpage havebla.

GENT, FLOR-URBO: 16-paĝa prospekto en Esperanto, kun de la urbo-centro kaj multkoloraj ilustraĵoj.

Interesatoj petu ĝin ĉe la Urba Oficejo por turismo, Burg. Braunplein 6, Gent.

Odd Fellowa Ordeno I.O.O.F.

Inter la multaj internacie reprezentataj unuigoj, kiuj koncepte pli malpli paralelas la esperantismon, ankaŭ troviĝas la politike kaj konfesia neŭtrala Odd Fellowa Ordeno I.O.O.F. (mallonge OF). Ĝia dekomenca helpserva karaktero, utiligata en vivolukaj konfliktoj, multe evoluis laŭ etika kaj humaneca principoj. Tiu internacia unuigo taskas al sia anaro altruisme influi la rigorajn ĉiutagaĵojn laŭ la devizo: AMIKECO-FRATAMO-VERECO. Kulminas ĝia doktrinaro en la strebado mildigi al kontraston inter la realo kaj idealo.

Analoga je la Zamenhofa profetajo, ankaŭ la OF-ano opinias, „ke iam la tempo venos, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj“. La OF-ano bone konsciiĝas, ke siaj altnivelaj idealoj ankoraŭ dormetas profunde en la sino de la estonteco. Tamen, la koro al li diras, ke nepre iam la situacio ŝanĝiĝos, kaj komuna memvola leĝo interligos la homojn el ĉiuj lingvoj kaj nacioj: la leĝo pri ĝenerala fratamo. Sed grandskala interligiĝo kondiĉigas lingvan interkompreniĝon de homo al homo trans la landlimojn, kio eblas nur post universala aplikado de Esperanto. Ni de provu simpatiigi al Esperanto la progreseman parton de la OF-anoj. Unuapaŝe ni enketu pri la ekzisto de OF-anoj en niaj vicoj. Tiucele la subskribinto pretas funkcii kiel peranto inter la verdstel-portantoj OF-anoj. Tiaj geamikoj, ankaŭ el la Rebekka-a branĉo kaj el la Manchester Unity, bonvolu skribi al la Delegito UEA: Fritz Schwarz, Wiesenstrasse 1, THUN (Svislando).

„Bruderhofoj“

La Bruderhofa komunumo en Anglujo nun uzas Esperanton kaj intencas sendi du „fratojn“ al la Universala Kongreso en Bolonjo. Nun fonditaj en Paragvaĵo, Urugvaĵo, Usono kaj Anglujo, la Bruderhofoj jam allogis pli ol mil homojn el dedok nacioj tute sin doni al vivo de frateco kaj komuna divideco. La unua komunumo fondiĝis en Germanujo en la jaro 1920-kaj Bruderhofo refondiĝis en tiu lando ĉi-printempe apud Nurnbergo. Nun la angla kaj germana lingvo estas ĉefe uzataj, sed pasintjare angla Esperantista familio aniĝis kaj tuj faris kontakton kun interesaj gesamideanoj en pli ol dekkvin landoj. Sekve, la Gefratato decidis sendi du „fratojn“ al Bolonjo kaj aliaj centroj en la espero ke Esperantistoj estos inter la multaj gastoj kiuj konstante vizitas la Bruderhofojn por partopreni en la laboro kaj sperti la gefratan vivmanieron. Legantoj, kiuj volas scii pli multe pri la Bruderhofa vivo, skribu al: The Society of Brothers, Wheathill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ

PREMION post n-roj 185/186: F-ino S. Popelier, Blankenberge, por V.E.B.:

SOLVOJ.

187. ĉemizoj; misalo; saboti; bokalo; kanelo; negoco; gorilo; ripari; paniko; nilono; lotoso; totala; tapiŝo; pikupo; kuseno; separo; padelo; derivi; rigida; ĝiceto.

188. Horiz.: matine; skoter; bradip; eki; etiked; are; cirkli; peoni; fi; astmo; dies; jartel; kajoli; pistil.

Vert.: ec; akre; instal; akir; indi; kamion; al; esper; ĵip; tepida; podi; iris; kroĉet; pere; sesi; driv.

189. EL DU FARU UNU,


tiel ke la unuaj literoj de la novaj vortoj formas proverbon.

1. arta + ĵeto; 2. dia + rando; 3. eta + zorga; 4. tio + sulko; 5. tri + skota; 6. paĝo + sego; 7. da + strigo; 8. tro + kreso; 9. laŭ + treni; 10. nu + skolita; 11. naŭ + poreo; 12. krio + logi; 13. viro + pagi; 14. rano + koti; 15. ses + virto; 16. kvin + salo; 17. kiso + pepo; 18. tegi + ledo; 19. sur + knabo; 20. peze + aglo; 21. sino + grio; 22. ame + blagi; 23. ruĝa + timi; 24. neta + fino; 25. ciro + bele; 26. via + dalio; 27. ĝuo + salvo.

190. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. antisepsaĵo ruĝkolora(R). 3. prezentanta la eblon de malsukceso; sovaĝa besto(R). 4. stulte rigardadi(R). 5. tre malfacile superirebla; kolekto da instrumentoj. 6. substanco por kolorigi teksaĵojn(R). 8. deŝiri floron(R); fabela estaĵeto(R). 10. malgaje; havanta ŝanĝigantajn kolorojn(R).

Vertikale. 1. mirigega faritaĵo(R). 2. delikate moviĝi en la aero tien kaj reen(R). 3. frumatene ĝi briletas sur kreskaĵoj(R). 4. parto de meblo(R).



5. ventego(R). 6. miksajo el alkoholaĵ trinkaĵoj(R). 7. ne havanta liberan tempon(R). 8. vermo(R). 9. mara mambesto(R). 10. allogi(R). 11. parto de la vizaĝo(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z., la membroj de F.I.L.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 25/IV/1955.

La Aŭstralia Asocio de Model-societoj aranĝos en Melburno dum Aŭg./Septembro 1955 sian 5-an grandan Internacian Foiro de Modeloj (kutime 250.000 vizitantoj). La Aŭstralia Esperanto-asocio disponos pri standon por elmontrado de modeloj faritaj de Esperantistaj tutmondaĵ. La organizantoj serĉas bonajn modelojn de ŝipoj, vagonaroj, aŭtomobiloj, motorboatoj, aeroplanoj k.t.p. kiuj respegulas seeble la naciajn karakterojn.

Modelojn kun Esperanta priskribo oni sendu al

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO
Box 2122 T, Elisabeth St.
Melbourne - Aŭstralio.

Resendo de la modeloj post la ekspozicio je kostoj de la organizantoj.

K.E.L.I. KONGRESO EN 1955

Tuj antaŭ la nunjara UNIVERSALA KONGRESO en Bolonjo, KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA kongresos en Francujo.

De la 23-a de julio ĝis la 30-a de julio (matene) la anoj, simpatiantoj, interesigantoj estos kune en la vasta ejo de „Société des Foyers U.F.A.” en la urbo Reims.

Temoj, diskutoj, ekskursoj, distraĵoj

promenadoj k.t.p. apartenas al la varia programo de la kongreso.

Reims estas mondfama urbo kun multe da vidindaĵoj kaj ĝi situas en ĉarma kaj interesplena parto de Francujo. Informoj kaj aligilo estas haveblaj ĉe S-ro J. Argenta, 43 Rue St Georges, Paris 9, Francujo.

Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ.

VERDLANDO VOKAS

Sciigoj kaj petoj :

Radio Roma. — La tempo de la Esperanto-programoj de ĉi tiu stacio ekde 16-III-1955 estas de 19.10—19.25.

„Bonsoir, l'Europe, ici Paris!” - Sub ĉi tiu titolo okazas ĉiusabate de 22.00—24.00 „eŭropa” programo diverslingva, ankaŭ parte en Esp. per Radio Pariza, 1829, 193, 514, 202, 48,39 m. B.v. skribi en Esperanto al RADIODIFFUSION FRANÇAISE, „Bonsoir, l'Europe”, 107 rue de Grenelle, PARIS per poŝtkarto kaj petu aŭdigi ĉiun ŝatatan diskon kiel saluton al eksterlanda amik(in)o kaj la stacio salutos en Esp.!

Radio Bilbao : Ekde 13-3-1955 la hispana radiostacio „Radio Bilbao” komencis disradii en Esperanto per ondo 264.8 metroj, t.e. 1.133 kilocikloj ĉiu sekunde. La novaj elsendoj okazos ĉiudimanĉe de 24.00 ĝis 24.30 h. M.E.T.: Post aŭskulto NEPRE skribu al „Radio Bilbao” str. Rodriguez Arias, 5-4a, en BILBAO — Hispanujo —. La estraron de la radiostacio tre interesas scii pri ĝia aŭdebleco.

Informoj pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn., Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.

Esperanto kaj la Olimpiaj Ludoj

La venontaj Olimpiaj Ludoj okazos dum Novembro 1956 en Melburno (Aŭstralio).

Ĉiuj hoteloj esas jam rezervitaj por eksterlandaj ĵurnalistoj kaj radio-reportistoj. La atletoj mem kaj funkcioj de eksterlandaj sport-organizoj loĝos en la „Olimpia Vilaĝo”. Ĉiuj aliaj vizitantoj devas do trovi loĝejon ĉe privatuloj.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio deziras helpi al ĉiuj vizitantoj Esperantistoj sed pro lokomanko ili devas anonci sin jam nun. Se eble ni aranĝos senkostan loĝadon ĉe samideanoj, sed ni nur povos respondi al tiuj leteroj, kiuj enhavos reafrankon. Ordinara letero (1 respondkuponon) daŭras 6-7 semajnojn, Aerpoŝta letero (2 respondkuponon) daŭras 8-12 tagojn.

Ni nur prizorgas loĝejon ĉe samideanoj, sed se vi volas havi teknikajn informojn pri la Olimpiaj Ludoj mem, vi devas rekte skribi al „Olympic Organising Committee” Melbourne (Aŭstralio). Multaj leteroj al la Olimpika Komitato ankaŭ montras la universalan disvastigadon de Esperanto. Sur la koverto kaj je la komenco de via letero indiku: „Language used: Esperanto” (Lingvo uzata: Esperanto) Indiku vian partoprenon al

Aŭstralia Esperanto-Asocio
Box 2122 T, Elizabeth Street,
Melbourne, AUSTRALIA.